


# Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

**JARABONO :**

Simpla : 7 fkoj
Bonfara : 12 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Č.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

**1968** **5**

# KULTURAJ KAJEROJ

1968 SEPTEMBRO - OKTOBRO

Dumonata informada kaj kultura revuo

**REDAKCIA KOMITATO :**

**Sekretario :**

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

**Komitatanoj :**

Paul Guillot
Frédéric Thebaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

## ENHAVO

**Pri Gresillon :**
Kio okazis ?

**Esperanto tra la mondo** — A. Frangeul

**Mezepoka vilaĝo**
en la 20-a jarcento — L. Chassériaud

**Aŭto-memoraĵoj** (I)
Tigro-bebo parolas — H. Lauwick (trad. S. Guillot)

**Ankaŭ la sciencistoj emas dubi** (II) — R. Jacquesson

**Ĉarma Skandinavio**

**Diversaj rakontoj :**
La kokinoj — J. Renard (trad. J. Lenel)
La homo — M. Twain (trad. H. Chavan)
Tra klinika fenestro — P. Potin

**Por via distro**
Nia konkurso — P. Chevalier

**Gramatiko per bonhumoro**

**KULTURAJ KAJEROJ**
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

**KULTURAJ KAJEROJ**
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
respondos al gramatikaj demandoj.

**KULTURAJ KAJEROJ**
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

# Pri Gresillon

# KIO OKAZIS ?

Kvar cent gesamideanoj el dudek unu landoj vizitis Gresillon dum Pasko kaj la somero. Gejunuloj kaj veteranoj apudiris, diskutis, laboris, ludis kune. La malnovaj esperantistoj ĝojis vidante, ke la gejunuloj interesiĝas pri la internacia lingvo, eble ne ĉiam pro la sama kialo kiel ili, sed tamen serioze. El la multaj problemoj, kiujn la nuntempaj gejunuloj fruntas, la problemo de interkompreniĝo ŝajnas al multaj el ili grava. Ili sentas, pli akre ol la maturaĝuloj, ke estas necese disrompi la naciajn ŝelojn kaj trovi la plej taŭgan interkomprenigilon.

Dum la somero, post la trisemajnaj kursoj de julio, kiujn kompetente gvidis S-ino Vincent kaj S-ro Ribot, okazis la Seminario de U.E.A., kun partopreno de D-ro Lapenna kaj S-roj Becker, Bormann, Sekelj kaj Thierry. Ne tiel sukcesa, kiel la organizantoj esperis, ĝi tamen ebligis la pritraktadon de la ĝenerala temo « Modernaj formoj de laboro en la nuntempa Esperanto-movado. » Ekskurso al la Loire-valo kaj al la urbo Nantes bone sukcesis kaj interesis la partoprenantojn. Fine de tiu Seminario multaj ĉeestintoj kune aŭ samtempe veturis al la Universala Kongreso.

En Aŭgusto la « Kulturaj Semajnoj » grupigis ĝis cent personoj. Ĉiuj, infanoj, gepatroj, geavoj kune partoprenis la esperanto-kursojn kaj la aliajn diversajn aktivaĵojn. Dank'al la ĉeesto de eksterlandanoj, tiu periodo kutime vizitata ĉefe de francoj, konis pli internacian etoson, kiu alkutimigis la francajn komencantojn al la alilandana elparolo kaj tuj montris al ili la valoron de Esperanto. Ge-sroj de Waard, Martinez, Jaumotte, Familioj Beaumont kaj Alexander, Tomiko Ikeda, Jirina Marhounova, Dragomir Liviĉ helpis per konversacioj, prelegetoj, vigligo de vesper-kluboj. Ankaŭ al aliaj ni ŝuldas multajn dankojn : al F-ino Turbillon, S-ino Gerrier, Ges-roj Dairon, kiuj gvidis la kursojn de Esperanto, fotoarto, korbofarado kaj librobindado ; al S-ro Thierry, prezidanto de la Franca Esperanto. Instituto kaj S-ro Bourdelon kiuj partoprenis en la ĉiam tre serioza ekzamenado de la kandidatoj.

La lasta periodo dediĉita al kursoj, kvankam malpli vivoplena pro tio, ke mankis la gejunuloj tiam pensantaj pri la malfermo de la lernejoj, tamen grupigis studemulojn, kiuj sub la gvidado de S-ro Ribot diligente laboris. Bedaŭrinde la nombro de la partoprenantoj ne estis tre granda.

Ankaŭ ĉi-jare esperantiĝis pliaj homoj, interplektiĝis novaj amikaj ligiloj, pruviĝis la realo de Esperanto. Ankaŭ ĉi-jare Gresillon montris al la esperantistaro, ke ĝi estas sensimila loko, kie Esperanto ne nur estas lingvo sed naskas neforgeseblan etoson. Ankaŭ ĉi-jare la Esperantista Kulturdomo gajnis.

**Tuj mendu :**

**POR LA PRAKTIKANTOJ**

(pluaj paŝoj al vivanta lingvo) de P. BABIN

La libro, kiun vi bezonas por via perfektiga kurso

**Prezo : 8,50 f. f. aŭ 15 respondkuponoj**

**NASKIĜO DE ESPERANTO-DOMO**

Historio de la fondado de Grésillon

**Prezo : 3,50 f.f. aŭ 6 respondkuponoj**

**M.C.E. Grésillon, 49 - BAUGE — Pk. Nantes 1485-39**

# Esperanto tra la Mondo

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

**U.K. en Madrido :**

Preskaŭ 1300 partoprenantoj el 38 landoj. Krom la laborkunsidoj dediĉitaj al aspektoj de la Homaj Rajtoj, la programo entenis la aranĝojn de Internacia Arta Festivalo, de porblindula kongreso, de multaj fakaj asocioj, la prelegojn de somera universitato, la oratoran kaj literaturan konkursojn, belajn ekskursojn kaj diversajn akceptojn.

Dum la festparolado, la prezidanto de U.E.A., Prof. Lapenna, skizis la tezojn, kiu laŭ li, devus regi la disvolviĝon kaj agadon de la nuna esperanto-movado.

La unua rezolucio de la kongreso koncernis la homajn rajtojn ; ĝi konstatas, ke la lingva diskriminacio manifestiĝas sur internacia nivelo (ekz. en la tutmondaj organismoj) kaj en la kadro de diversaj ŝtatoj. La rezolucio esprimas la konvinkon, ke la lingvaj problemoj povas esti efike kaj juste solvitaj nur per adopto de la internacia lingvo.

La dua rezolucio traktis la uzadon de esperanto en turismo. Pluraj registaroj estis oficiale reprezentitaj en la kongreso. Internacia Arta Teatro regalis la spektantojn per sep teatraĵoj.

**SAT-Kongreso en Utrecht :**

Kun 347 partoprenantoj el 17 landoj. Okazis manifestacio al la Zamenhofa Monumento, sindikata forumo, ekskursoj al Arnhem, Eindooven, Gouda kaj Kinderdijk. En la kadro de la Laborista Universitato prelegis : Prof. Minnaert de la Utrechta Universitato, S-ino Lecat, Sroj Kunze kaj Schalmey. La kultura vespero konsistis el popoldancoj kaj muziko. Grava taga gazeto aperigis tutan paĝon ilustritan en esperanto.

**Aliaj renkontiĝoj :**

Komuna kongreso de esperantistaj katolikoj kaj protestantoj en Limburg, Germanio, kun 200 partoprenantoj el 18 landoj.

Junulara kongreso de TEJO en Tarragona, Hispanio kun 132 gejunuloj el 15 landoj.

Kongreso de STELO en Aix-en-Provence, kun 50 gestudentoj el 10 landoj.

Pol-german-ĉeĥa renkontiĝo en Ĉeĥoslovakio en aŭgusto kun pli ol 150 partoprenantoj.

Internacia Festivalo de pupteatroj kaj Festivalo de profesiaj teatroj en Jugoslavio.

Restadoj en Gresillon kun pli ol 400 partoprenantoj el 20 landoj.

**Venontjaraj kongresoj :**

— Universala kongreso de UEA en Helsinki, Finlando.

— SAT-Kongreso en Novi-Sad, Jugoslavio.

— Internacia Kongreso de la Fervojistoj en Avignon, Francio.

**Elnonaĵoj :**

— La apero de **Plena Ilustrita Vortaro** dependas de via decido. La manuskripto estas preta. Sed SAT eldonos ĝin nur se 2.000 personoj estas pretaj mendi kaj pagi ĝin. La nombro estas preskaŭ atingita. Antaŭvidita prezo : 69 guldenoj aŭ 95 francaj frankoj. La interesatoj sendu karton al U.E.A. aŭ al S.A.T. aŭ la Libro-Servo de Gresillon promesante firme aĉeti la vortaron, kiam oni petos la pagon.

— « La Monda Lingvo Problemo » baldaŭ aperos. Ĝi estas nova internacia interdisciplina scienca revuo dediĉita al ĝenerala pristudo de la lingva problemo. Sub aŭspicioj de U.E.A., eldonita de la firmo Mouton, ĝi aperigos originalajn studojn en diversaj naciaj lingvoj kun ampleksaj resumoj en esperanto. La tri numeroj de volumo I aperos en 1969, sed la unua numero jam estos preta por la 10-a de decembro. Jara abono : 25 guld. aŭ 34 fr.

— « Elektitaj paroladoj kaj prelegoj » de Prof. Lapenna, estos por vi neelĉerpebla fonto de argumentoj kaj tezoj por artikoloj kaj paroladoj.

— « La Esperanto-Societo », broŝuro eldonita de U.E.A. liveras multajn valorajn knosilojn.

— « Gepatra Bulteno » aperas kvaronjare ; multobligita kaj ilustrita ĝi estas helpilo por gepatroj, kiuj instruas esperanton al siaj infanoj. Jarabono : 3,50 guld ĉe U.E.A.

— « Literatura Kajero », la plej nova iniciato de la brazilaj samideanoj, serĉas abonantojn kàj kunlaborantojn. Skribu al : Henerik Kocher, rua Baltazar Lisboa, 34 (zc-II) (**Rio de Janeiro,** Brazilo).

Fame Konatan francan brandon KONJAKO, disvendas S-ano DESPEYROUX, 200, rue Fbg St-Denis, 75 - Paris, 10e. Origina deveno kaj altkvalito garantiataj, Ekspedo en ĉiujn pagipovajn landojn. Povas ankaŭ liveri al pograndaj revendistoj. Informpetu !

# MEZEPOKA VILAĜO EN LA DUDEKA JARCENTO

Leginte la titolon, eble vi opinias, karaj gelegantoj, ke mi ĉi-tie rakontos pri unu el tiuj tre malnovaj vilaĝoj, kiuj preskaŭ mirakle postvivis ĉiujn historiajn okazintaĵojn, ĉiujn brulegojn, ĉiujn militojn, kaj ankoraŭ nun montras al la interesataj vizitantoj sian mezepokan aspekton. Ne ! ne tia estas la vilaĝo, pri kiu vi hodiaŭ legos en tiu ĉi revua artikolo. Temas pri artefarita vilaĝo, konstruita laŭ la mezepoka konstruarto en la ĉirkaŭaĵo de mia franca urbo ROYAN (pli precize en la t.n. loko « PALMYROSA »), kaj en kiu laboras laŭ antikva maniero multaj diversaj metiistoj, mezepoke vestitaj, por montri al la nuntempaj vizitantoj kaj eventualaj aĉetantoj siajn belajn laboraĵojn, permane faritajn. Ili venas de pluraj francaj provincoj, ankaŭ eĉ de eksterlando, kaj tie laboras dum la belaj someraj monatoj por ĉies granda plezuro. Ĉiuj kunportis siajn proprajn ilojn, kaj provas revivigi por ĉiuj interesatoj la malnovajn tradiciojn metiistajn de Francujo kaj aliaj eŭropaj landoj.

Sed ni kune iru en la vilaĝon.

Mallarĝaj estas la stratoj, eĉ kelkaj estas nur stratetoj ; ambaŭflanke staras unu-du-etaĝaj domoj kun trianguloj frontonoj, kaj kies fasadoj, ofte korbele konstruitaj, montras siajn lignajn trabojn kiel ĉefan ornamaĵon. Tamen, de kelkaj el tiuj fasadoj pendas belaj ŝildoj el forĝita fero, kiuj simbolas la metiojn de la laboristoj. Ĉiuj teretaĝaj ĉambroj estas laborejoj kaj butikoj, en kiuj fariĝas kaj vendiĝas la interesplenaj aĵoj fabrikitaj de la metiistoj. Meze de la stratoj pendas lanternoj, kiuj vespere kaj nokte prilumas la vojon.

Krom la butikoj de la metiistoj estas en tiu vilaĝo ankaŭ la necesa gastejo, kie oni povas manĝi laŭ la mezepoka maniero bonegajn nutraĵojn,... kiuj kompreneble ne datiĝas de la mezepoka tempo, sed estas tute freŝaj kaj bongustaj, ĉar preparis ilin spertaj kuiristoj, rostistoj, porkaĵistoj kaj kukistoj, kiuj loĝas en la vilaĝo mem. Se vi estas manĝegemuloj, vi ja povos « faire ripaille », t.e. festenegi, eĉ diboĉe manĝi ; sed certe tiaj vi ne estas, karaj gesamideanoj, kaj saĝe kontentiĝos per bonegaj sed moderaj manĝoj kompletigataj de bona franca vino. En aparta trinkejo, dum vi sidos sur tripiedaj seĝoj el kruda ligno aŭ sur benkoj, oni alportos al vi laŭ mendo, sur la barelojn kiuj servas kiel tabloj, ĉu la plej bonajn vinojn el la regiono, ĉu malnovan trinkaĵon hodiaŭ malfacile troveblan en ordinaraj trinkejoj, la « mielakvon », kiun la mezepokaj homoj ofte trinkis, kaj kiun la antikvaj Skandinavoj kredis de dia deveno.

Sed ni ne devas forgesi la preĝejon, — aŭ pli ĝuste la kapelon — sen kiu neniu franca vilaĝo



estus vere mezepoka vilaĝo, kaj kies modesta sonorilturo iom superstaras la aliajn konstruaĵojn de la loĝloko. En ĝi ĉiudimanĉe okazas la pormetiista

diservo, kiun povas ĉeesti, kompreneble, ankaŭ la vizitantoj.

Ni promenu sur la stratoj de la vilaĝo : sur ŝtona benko sidas mezepoke vestitaj, du virinoj, kiuj lerte babiladas. Sed ni ne aŭskultu ilin, ĉar ili verŝajne parolas la nuntempan francan lingvon, kaj tio iomete ĝenus nin en tiu malnova kadro. Ni preterpasu. Ĉirkaŭ ĵonglisto en kolorriĉa vesto ariĝis enloĝantoj de la strato... kaj ankaŭ — bedaŭrinde, se mi aŭdacas tion diri — kelkaj nuntempaj turistoj, kies vestaĵoj vere tro kontrastas kun tiuj pli interesaj de la vilaĝanoj. Sed la ĉefa intereso por ni iras al la metiistoj, kies laborejojn ni devas nun zorge viziti.



Ĉi tie sidas la potisto, kiu arte faras el argilo sur sia ronda ligna tornilo, per piedo turnata, belan ĉi-regionan vazon kun tre eleganta kolo, en kiu belaspektos viaj floroj, se vi aĉetos ĝin... aŭ alian similan jam finitan de la sama metiisto. Sur la bretoj de la butiko staras aŭ kuŝas multaj diversformaj vazoj, bovloj, tasoj, pladoj flore dekoraciitaj. Apude troviĝas la forno, en kiu la potisto kaj la najbara ceramikisto kuiras siajn verkaĵojn, en kiujn ili ame metis sian tutan artkapablon.

Sed kio estas tiu tiktako, kiun ni aŭdas el la proksima budo? Estas la laborbruo de la teksisto — aŭ pli ĝuste de la teksistino — kiu, per ligna tre malnova teksmaŝino, zorge faras, laŭ mezepoka modo, tiujn belajn teksaĵojn (skarpojn, kravatojn, tapiŝojn, ktp), kiujn oni denove ŝatas por ornami sian veston aŭ sian meblaron en la nuntempaj loĝejoj, ofte tro malvarme aspektantaj se nur modernaj aĵoj meblas ilin. Eble vi speciale interesiĝos pri laieksado de la t.n. « tapis de lirette », farataj de ĉiuj vilaĝaj teksistoj de nia regiono antaŭ iom pli ol cent jaroj, kaj nun denove teksataj de tiu ĉi nuntempa teksistino. Tio do postulas kelkajn klarigojn : kiam niaj praavinoj fasonis vestaĵojn, se restis neuzitaj pecetoj de ŝtofo, ili ne forĵetis tiujn restaĵojn, sed ŝpare konservis ilin ; ili poste dispecigis ilin en longajn mallarĝajn bendojn, kiujn ili kudris unu al la alia per iliaj ekstremaĵoj, por fari longegajn banderolojn multkolorajn. Kiam ili posedis sufiĉe da tiaj banderoloj, de ili buligitaj, ili portis ilin al la teksisto, kiu transformis ilin en buntajn fortikajn tapiŝojn aŭ littapiŝojn, uzante ilin kiel veftofadenon, dum li uzis normalan linan aŭ kabanan fadenon por la varpo. Longtempe mi kredis, ke tiaj tapiŝoj — kiujn ni nomas « tapis de lirette » (pron. tapi de liret) — estas nur francaj, eĉ nur regionaj teksaĵoj ; sed dank' al Esperanto mi eksciis, ke ankaŭ en aliaj landoj, ekzemple en Hungarujo, oni teksis eĉ ankoraŭ teksas similajn tapiŝojn, kion klare montris al mi belaj folkloraj bildkartoj al mi senditaj de hungara amiko antaŭ kelkaj jaroj.

(daŭrigota)

L. CHASSERIAUD.

**Ĉu vi pagis vian abonon ?**
**Restas al vi nur tri semajnojn por tion fari.**

**Ne atendu plu ! Pagu al via peranto aŭ al :**

**Pierre BABIN, 13, bd de la Chauvinière — 44 - NANTES**

**Pk. Nantes 2 813 61**

# Aŭto-memoraĵoj

# Tigro-Bebo, moderna aŭtomobilo, parolas

Antaŭ nelonge mi tranoktis en garaĝo apud aŭto, tre malnova kun tremanta voĉo pro ĝiaj tremŝaltiloj tute eluzitaj ; ĝiaj bruliloj preskaŭ ne funkciis, kaj ĝi atendis magnetomaŝinon. Longe ĝi rakontis sian karieron-vere pitoreskan historion — kaj donis al mi adreson de unu el siaj amikinoj, tiel kaduka kiel ĝi :

Iru al Billancourt ; proksime de la Renault-uzinoj troviĝas en ŝirmejeto la unua 2-CV; Louis Renault, propramane, ĝin faris en remizo pruntedonita de lia familio, kiu cetere abunde lin riproĉis, aŭgurante, ke li atingos nenion.

Efektive, tie ĉi dormas malnova aŭtomobilo tute simila al tiu deponita en Arts et Métiers Konservatorio. Apud ĝi troviĝas Marne-taksio kaj 2-3 veturiloj de la praa epoko. Ili havis manilojn por stiri kaj la pedalo estis ne akcelilo sed « moderigilo ».

Vere miriga estas la aŭto-historio pludiras la maljunulino.

Unue oni devas memori, ke ĝi komenciĝas kiam estis nur rajdemuloj. La unua praavo probable estis Vaucanson, kiu, inter aŭtomatoj, kreis la « anason kiu povas digesti ». En 1748 li ankaŭ konstruis ĉaron kun dentaĵoj kaj risortoj. Poste Cugnot ellaboris vapor-veturilon.

— Je kioma rapideco ĝi ruliĝis.

— He ! he ! jam je 3 km. hore. Malfeliĉe je ĉiuj 12 minutoj oni nepre devis halti dum kvaronhoro.

Choiseul, la unua mecenato, mendis saman veturilon kontraŭ 20 milionoj. Sed, je la unua provo, Cugnot koliziis kun muro kaj ĉion difektis.

Napoleon, kiu ne fidis aŭto-estontecon, kaj opiniis tion nur frenezaĵeto (kio ne surprizas, pro la tiutempa stato de la aŭtomobilo), tamen atribuis al Cugnot 1.000 frankan renton jare.

Je la sama momento angla inventisto konstruis veturilon, kiu superis la rapidecon de piediranto. Ja ! sufiĉe bone!

Tamen, mizerulo estis Cugnot, kiam li mortis ; ankaŭ la angla inventinto.

Nur en 1825 oni konatiĝis kun la Rapideco. Vapor-diliĝencoj atingis 20 km. hore. Fronte al tio anglaj kamparanoj ekkoleris ; sekve la juĝistoj malpermesis tian veturadon ; sed finfine oni ĝin akceptis, kondiĉe ke, antaŭirante ilin, viro marŝu, agitanta ruĝan flagon.

Nur en 1896 tiu leĝo estis nuligita.

Tamen, en Parizo, en januaro 1869, okazis la unua plej grava provo. Estis la sepa matene, la inventinto nomita Ravel, estis nepre kontrolita de 2 policanoj, kiuj apudiris ambaŭflanke de la veturilo. Kompreneble, estis malpermesite iri pli rapide ol ili.

— Kie tio okazis?

— Sur la strato « la Ribelo » .

Sed nia Ravel tuj imagis ruzaĵon. Ĉar estis frumatene — la sepa — kaj tre malvarme — en januaro — li kondukis la 2 policanojn en la proksiman trinkejon... ilin ebriigis kaj ilin instalis ambaŭflanke SUR la veturilo... kaj akcelis. La 2 policanoj, kies vidkapablo ne plu estis tre hela, falis teren (la fakto estas historia).

Iom pli poste Ravel, kiu estis sukcesinta, foriris al Hispanujo. Sed estis longa vojaĝo ... kiun li faris trajne. Dume oni ŝtelis lian veturilon, kiun oni neniam plu revidis.

La unuaj provoj de Amedée Bollée okazis en 1873. La unua persono, kiun li renkontis estis ĝendarmo, kiu demandis lin ĉu li havis « cirkulad-permeson ». Neniu nek Bollée, nek la ĝendarmo, sciis ĉu tio ekzistis ; konklude oni demandis pri tio la Prefekton : necesis ĝin krei kaj jen la unua « Griza Karto ».

— Ĉu vere, ke, tiam, estis unu nura aŭtomobilo en Francujo ?

— Jes, longtempe estis tiu nura veturilo.

Sed ĝi sukcesis vojiri ; pli malpli bone ĝi ruliĝis !

En oktobro 1875 Bollée iris de Le Mans al Paris (230 km.) elektante vojiron tra Chartres por alfronti montetojn ; kompreneble oni ankoraŭ ne estis sur Monto Tourmalet !

Lia alveno en Parizo estis vera triumfo. Sur la Etoile Placo li okazigis leĝeran konfuzon : oni devas memori, ke, tiutempe, ĉiuj pasantoj direktiĝis maldekstren. La Parizanoj nur malrapide kvietiĝis.

Kvankam la vojaĝo postulis malmulte da benzino, ĝi iĝis tre multekosta pro la justico-taksoj : la ĝendarmoj estis multnombraj sed havis nur unu veturilon por ekzerciĝi ; inter Chartres kaj Rambouillet, Bollée kolektis 75 monpunojn.

Cetere Bollée havis geniajn inspirojn : estas li, kiu elpensis transversajn kardanojn, kiujn amerikaj aŭtistoj



longtempe konsideris kiel grandan novaĵon.

Kaj venis la tempo de François Forest : en 1881 — li estis jam konstruinta kvartaktan motoron,

— li estis jam inventinta la ajuton, kiu de tiu momento multe tedas la aŭtistojn, kiam ĝi ne plu funkcias,

— li estis jam farinta la unuan 4-cilindran aŭton.

Granda homo ! Mi konatiĝis kun li ; li havis belan barbon .

Strange : ĉiuj tiuj viroj estis barbuloj ; kiam unu malaperis, alia barbulo montriĝis !

Modestulo estis François Forest, kaj ankaŭ li mortis malriĉa

Nun, aŭskultu am-rakonton

Daimler, germano, venis en Parizon en 1885 kaj kreis la unuan motorciklon ; estis inventaĵo, kiu faris bruon !

En Parizo Daimler trovis reprezentanton : Sarrazin. Iom pli poste, Sarrazin, kondamnita de la kuracistoj, ĉesigis tiun asocion sed konsilis al Daimler daŭrigi la aferon.

Sarrazin mortis. S-ro Levassor venis al S-ino Sarrazin por prezenti al ŝi siajn kondolencojn.

Jen la nova barbulo : Emile Levassor.

Levassor estis asociata kun S-ro Panhard, kaj kune Ili faris mekanikajn konstruaĵojn, t.e. aĵoj por ĉar-kaj-rad-faristoj ; ili ankaŭ kreis maŝinon por tranĉi la lignon.

S-ino Sarrazin edziniĝis kun nia brava Levassor.

Tiam la plej grava aŭto-asocio naskiĝis, kiam S-roj Panhard kaj Levassor konatiĝinte kun Peugeot-fratoj — ŝtalo-fabrikantoj — pensis kunigi la 2 uzinojn.

— Ŝajnas al mi, ke tiutempe Peugeot fabrikis ĉarumojn ?

— Jes, tute vere, ĉarumojn, ŝovelilojn... cetere ili daŭrigis tiun fabrikadon. De tiu momento ili precipe kliniĝis al ŝtalaj bartoj por la krinolinoj. Poste ili interesiĝis ne pri mamzonoj, sed pri la tiamaj korsetoj, kies 3 metalaj bendoj sub la mamoj ilin gracie subtenis.

Levassor kaj Peugeot finfine renkontiĝis kun Daimler. Bedaŭrinde la « Daimler » tre malfacile suprengrimpis deklivojn pli ol 3 %.

Fronte al tio, ĉiuj febre cerbumis, kaj oni starigis veturilon kun « malantaŭa » motoro, longtempe antaŭ la 4 CV Renault.

Sed disiĝo okazis. Armand Peugeot preferis forlasi siajn asociitojn (same okazis por Dodge-Ford kiuj, tuj de la komenco, kontraŭstaris unu la alian. Dodge retiriĝis ; tion li bedaŭris sian tutan vivon).

En 1905 Léon Serpollet reaperigas la Vaporon.

— Jes, mi konas lin. En plumba vesto li staras sur la placo « Les Ternes » apud S-t Ferdinand. Estas li, kiu devigas la aŭtistojn al abrupta ĝirado, kiu endanĝerigas la piedirantojn. »

Sed la benzino malabunde alvenis (same kiel al kelkaj karburiloj).

Okazis ke, ĉirkaŭ 1880, De Dion (la markizo De Dion, kies familio altrudis al li juĝan Konsilion) aĉetante artiklojn por kotiljono, trovis etan vapor-lokomotivon, kiu lin amuzis. Li vizitis S-ron Bouton, kiu malmulte gajnis per fabrikado de tiu ludilo. Ili asociiĝis (De Dion-Bouton) por ambaŭ konstrui verajn aŭtomobilojn.

Tiuj ĉi forte varmumis ; ĉar la tiamaj oleoj ne eltenis, oni anstataŭe grasis ilin per lardo.

Hervé LAUWICH.

(trad. S. Guillot).

(daŭrigota).



Ni disponas pri stoketo de poŝtmarkoj neuzitaj de Ĉehoslovakio, Rumanio, Hungario. Ni povas vendi ilin je duono de la katalog-prezoj.

Sendu : 5, 10 aŭ 20 frankojn al :

S-ro Giloteaux, 3 allé Béranger

59 - Croix - Francujo

P.K. Lille 2 269 89

# Ankaŭ la Sciencistoj Emas Dubi
## (Fino)

Sed ni nun lasu niajn ideojn pri tiu elektrona nubo, memorante la daton de ilia naskiĝo : 1911.

Intertempe la atoma nukleo, aŭ pli precize la opinion pri ĝi, kiun instigis Lavoisier, spertis tute ekterordinaran aventuron : tiu nukleo, kiu difinis la elementon, devis kiel ĝi, esti neŝanĝebla kaj eterna. Fakte la radioaktivaj fenomenoj estis eltrovitaj en 1900. Kelkaj atomoj spontane diseriĝas laŭ konstanta frakcio en precizigita tempo. Ekzemple se en iu momento ekzistas 64 atomoj, post difinita tempo ekzistos nur la duono, 32, post duobla tempo 16, post triobla tempo 8, ktp... ĝis totala neniiĝo. Ekzemple por la Radiumo, tiu tempo estas 1800 jaroj proksimume, sed por aliaj ĝi povas esti nur kelkaj tagoj, minutoj, aŭ eĉ tre malgranda frakcio da sekundo.

Ĉiu atomo kiu transformiĝas, naskas alian tute malsaman atomon, kaj eligas, laŭ la kazoj, heliuman nukleon (a-ero) aŭ elektronon (b-ero). Ekzemple la radiumo, solida korpo, transformiĝas en du gasojn : la radonon kaj la heliumon ; tiu radono ankaŭ transformiĝas kaj tiel plu ĝis kiam oni fine alvenas al la plumbo, kiu ne plu estas radioaktiva. Plue oni konstatis, ke la maso de la korpoj produktitaj de la diseriĝo de la atomo estas malpli granda ol tiu de la unua atomo.

Do tiuj radioaktivaj fenomenoj estas kontraŭaj al la leĝoj de Lavoisier : konservado de la elemento, konservado de la maso.

Rutherford sukcesis en 1917 ŝanĝi oksigenon en nitrogenon per bombado de a-eroj, kaj tiel kontraŭis, alian fojon, la leĝon pri konservado de la oksigena atomo.

La fizikistoj tiam imagis modelon de atomaj nukleoj. Ili konstruis sian teorion sur la fakto, ke la radioaktivaj atomoj eligas elektronojn ĉar ili enhavas ilin (vero de Sro de Lapalisse, kiu montriĝis falsa), kaj sur la fakto, ke ilia maso estis egala (preskaŭ) je entjero de masoj de hidrogenaj atomoj, aŭ protonoj, ĉar ili entenis tian nombron da protonoj. La protonoj fiksis la mason de la nukleo ; la nombro de la protonoj kaj de la elektronoj, pozitivaj kaj negativaj, estis kalkulitaj tiel, ke ili donis la elektran ŝarĝon de la nukleo. Ekzemple, la nukleo de heliumo pezas 4 foje pli ol I protono proksimume, sed ĝia ŝarĝo estas nur la duoblo. Prenante, kiel unuon, la mason kaj ŝarĝon de la protono, la heliuma atomo estas karakterizita de 4 por la maso kaj 2 por la ŝarĝo. Tiel la heliuma nukleo konstituiĝus el 4 protonoj donantaj la mason 4, al kiuj oni aldonas 2 elektronojn nomitajn « nukleaj » kun individua ŝarĝo — I, tiel ke la ŝarĝo iĝu 4 — 2 = + 2.

La radiuma atomo kun maso 226 kaj ŝarĝo 88 estas konstruita tiam, laŭ tiuj ideoj, de 226 protonoj kaj 226 — 88 = 138 nukleaj elektronoj. Ni rimarku, ke tiuj 226 + 138 = + 364 eroj loĝas en nukleo, kies volumo estas unu miliardo da fojoj malpli granda ol tiu de la atomo. Kompreneble ĉio turniĝas, kiel la elektronoj ĉirkaŭ la nukleo.

Dum 25 jaroj proksimume, tiuj konceptoj de la atomo estis instruataj, kiel absoluta vero kaj konsiderataj de ĉiuj tiaj

Dubo naskiĝis ek de 1927 : la elektrono ne estas nur ero, ĝi ankaŭ povas difrakti, kiel luma aŭ likvida ondo. Jen en kio konsistas la diferenco. Prenu plankon boritan laŭ fendo. Se vi sendas projektilon tra la fendo ĝi trairos la plankon sen ŝanĝo de direkto, laŭ rekta linio. Se, kontraŭe, vi metas la plankon paralela al ondetoj moviĝantaj sur la surfaco de akvo, vi vidos malantaŭ la planko cirklan ondon kies centro estas la fendo kaj kiu foriras kun pli kaj pli granda radiuso, anstataŭ simplan ondeton kun sama larĝeco ol la fendo.

La elektrono kondutas laŭ ambaŭ manieroj samtempe. Tio kontraŭbatas nian prudenton sed estas tamen reala.

Tiam naskiĝis la ondo-mekaniko ; la elektrono ne plu povas esti lokita sur trajektorio, ne plu ekzitas trajektorioj ĉirkaŭ la nukleo. Oni nur povas diri, ke la ebleco trovi elektronon sur unu punkto estas pli granda ol sur alia punkto. Tial nuntempe la nukleo ne plu estas ĉirkaŭata de ia nombro da sateligitaj elektronoj, sed de probablecaj nuboj ; ju pli densaj ili estas, des pli granda estas la probableco trovi elektronon en ili.

Koncerne la ideojn pri la nukleo, ili estis firme forĵetitaj en 1940, kiam oni eltrovis novan eron : la neŭtronon. Tiu ero estas elektre neŭtra kaj ĝia maso estas I (t.e. la maso de la protono), kaj por tiu novnakisto oni tuj faris en la laboratorioj, bonegan lokon. Ĝi iĝis, kun la protono, la 2a konstituanto de la nukleo, kie ne plu ekzistus elektronoj.

La heliuma nukleo entenus 2 protonojn kaj 2 neŭtronojn. Tio efektive donas mason, kiu valoras 4, kaj elektran ŝarĝon, kiu valoras 2. La nukleo de la radiuma atomo konsistus do el 226 eroj : 88 protonoj kiuj fiksas ĝian ŝarĝon, kaj 226 — 88 = 138 neŭtronoj.

Per malkovro de aliaj eroj, oni povis klarigi la eligadon de negativaj eroj (elektronoj) el nukleo kiu entenas nur pozitivajn aŭ neŭtrajn erojn.

Sed tio estas alia afero.

Jam de 25 jaroj ekzistas tiuj teorioj, kaj ĉiuj konsentas pri ili. Sed laŭ la sinsekvo de teorioj, kiun ni ĵus trarigardis, tio estas jam longa periodo. La ideoj antaŭ Lavoisier daŭris plurajn jarcentojn, tiuj de Lavoisier unu jarcenton, la modelo de Rutherford 20 jarojn, tiu de la nukleaj elektronoj 25 jarojn.

La fizikistoj estas tre ŝanĝemaj kaj nenio pruvas ke ili posedas la absolutan veron. Tial vere saĝaj kaj sin konformantaj al la historia evoluo aperas la sciencistoj, kiuj diras, kiel ni jam asertis, ke dum la 10 venontaj jaroj la fundamentaj bazoj de niaj scioj estos eble tute ŝanĝitaj.

R. JACQUESSON.

# Ĉarma Skandinavio



Oni diras, ke antaŭ 20 000 jaroj jam konata estis Danio. La tiama komforto verŝajne estis negranda, sed de tiu tempo la Danoj multe lernis. Kompreneble nenio tie estas la plej granda, la plej vasta, la plej impona en la mondo ; sed tiu lando posedas ion specialan : misteran kaj fervoregan ĉarmon. Ĝi posedas Kopenhagon, mirindan, ĝojoplenan ĉefurbon ; fejnan kamparon kun pajlo-tegmentitaj dometoj kaj komfortaj gastejoj ; popolon, kiu sukcesis akordigi modernan efikecon kun plezuroj de epoko, kiam la vivo-ritmo estis pli kvieta. Vi ankoraŭ trovas tie la faman etoson de la rakontoj de Andersen.



De la danaj ebenaĵoj kaj de la kvietaj lagoj de Suomio al la fjordoj kaj montaroj de Norvegio la ŝanĝiĝo estas miriga. Norvegio estas eble unu el la plej belaj landoj en la mondo. En la somero vi povas tie ĝui la noktomezan sunon, la ŝipveturadon sur la fjordoj tiom mallarĝaj, ke nur levante la kapon vi povas vidi la ĉielon. En la vintro vi povas skii ĉar tie naskiĝis skiado.



Sep milionoj da Svedoj transformis sian landon en ŝtaton, kie la vivnivelo estas tre alta. Sed en suda Svedio, regiono de kasteloj, la turisto ankoraŭ trovos la graciajn, noblajn trajtojn de la pasintaj jarcentoj. En Lalekarlio aŭ ĉe la lago Siljan, li povos kolekti la sep florojn, kiuj, ŝovitaj sub la kapkusenon la vesperon antaŭ la Sankta-Johana tago, sonĝigos lin pri baldaŭa amo. Pli norde li vidos la laponajn boacarojn.

Survoje al la Universala Kongreso en Helsinki, nepre vizitu Skandinavion.

# Diversaj Rakontoj

## LA KOKINOJ

Mi vetas, diras sinjorino Lepik, ke Honora ree forgesis fermi la kokinejon.

Estas vere, Oni povas certigi al si tion tra la fenestro. Tie, funde de la granda korto, la kokineja kabano eltranĉas en la nokto la nigran kvadraton de sia malfermita pordo.

— Felikso, ĉu vi iros fermi ĝin ? diras sinjorino Lepik al la plej aĝa el siaj tri infanoj.

— Mi ne estas ĉi tie por okupiĝi pri kokinoj, diras Felikso. knabo pala, malvigla kaj timena.

— Kaj vi Ernesta ?

— Ho ! panjo, mi tro timus !

Frato Felikso kaj fratino Ernesta apenaŭ levas la kapon por respondi. Tre interesate, ili legas kun la kubutoj sur la tablo, preskaŭ frunton ĉe frunto.

— Dio, kiel mi stultas ! diras sinjorino Lepik. Al mi ne venis la ideo. Karotharulo iru fermi la kokinejon !

Ŝi donas ĉi amnomon al sia lastenaskita, ĉar li havas rufajn harojn kaj lentugan haŭton. Karotharulo, kiu sub la tablo ludas per nenio, ekstaras kaj timeme diras.

— Sed panjo, ankaŭ mi timas.

— Ĉu eble ? respondas sinjorino Lepik, granda knabo kiel vi ! estas ŝerco. Rapidu pi petas !

— Oni lin konas ; li estas maltimema, kiel virkapro, diras lia fratino Ernesta.

